

Johann Wolfgang von Goethe,

Same

tradukita de Pejno Simono

Super montopintoj —
 silent',
 tra pinopingo
 la senvent'
 spiras sen fort';
 arbare la birdoj ekmutas.
 Pretu, aludas
 silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-356-1974 (2014-03-14
 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Johann Wolfgang von Goethe,

Egalaĵo (Noktokanto
 de migranto)

tradukita de Manfredo Ratislavo

Super ĉio iĝas
 Kviet',
 Kaj ne moviĝas
 Pro ventet'
 Iu foli';
 Silentas la birdoj ĉirkaŭe.
 Atendu – baldaŭe
 Ripozos vi.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-01.*

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-
 20 14:44:12)

Johann Wolfgang von Goethe,

Super montoj regas kviet'

tradukita de Poul Thorsen

Super montoj
 regas kviet',
 tra l' foliaro
 nur ventet'
 spiras kun trem'.
 Birdoj arbare silentas,
 se vi atendas,
 pacas vi mem.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 – †2006-01-30).*

Arg-356-708 (2010-05-28
 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.